



## Enhavo

- Baltiaj Eo-Tagoj – nur post unu jaro
- Bulgario invitas al literatura konkurso
- Informilo por Interlingvistoj (Ipl)

Redakcio: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.

*EKO 2020-20 sendita el Budapeŝto, la 30an de aprilo.*

*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en multaj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

## BET-56 prokrastita unu jaron

La jaro 2020 eniros en la historion per tutmonda lukto kontraŭ malsano Covid-19 kaŭzita de la nova koronaviruso. En Latvio daŭras la eksterordinara situacio, kio malpermesas organizi publikajn eventojn. Tio malebligas al la organizantoj de la 56-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-56) efektiviĝi la aranĝon. Tial laŭ interkonsento kun la prezidantoj de la Estona kaj Litova Esperanto-Asocioj Organiza Komitato decidis prokrasti BET-56 al 2021. La loko restos la sama – Jelgava, datoj: de la 3-a ĝis la 10-a de julio 2021.

Al la dezirantoj malaliĝi la kotizo estos repagita. Same oni pretas repagi la antaŭpagitan monon pri loĝado kaj manĝado. Ĉiu aliĝinto ricevos informon retmesaĝe. Ni ĉiuj havu fortan sanon, bonan humoron kaj renkontiĝu dum BET-56 en 2021!

Margarita Želve, Prezidantino de Latvia Esperanto-Asocio

## Literatura Konkurso Hristo Gorov

Hristo Gorov (Hrima) estis unu el la plej elstaraj bulgaraj esperantistoj, talenta Esperanta verkisto, poeto, tradukisto kaj publicisto. Bulgara Esperanto-Asocio (BEA) anoncas Internacian Esperantan Literaturan Konkurson. En la konkurso povos partopreni geesperantistoj el ĉiuj landoj. La konkurso estos por **rakonto kaj eseo**.



Ĉiu aŭtoro rajtas partopreni per unu rakonto aŭ per unu eseo, originale verkita en Esperanto. La konkurso ne havas konkretan temon. La verkoj estu tajpitaj komputile kaj ĉiu aŭtoro nepre uzu la Esperantan alfabeton kun unikod-kongruaj supersignoj. La aŭtoroj indiku sian sekson. La verkoj estu subskribitaj per la vera nomo de la aŭtoro, aperu plena poŝtadreso, telefono kaj retadreso. La rakontoj kaj eseoj estu maksimume 3-paĝaj, formato A4, la litertipo estu Times New Roman 12-punktaj

**La gajnintoj ricevos valorajn premiojn.**

**Bonvolu sendi viajn kontribuojn ĝis la 30-a de septembro 2020 al: [modest@abv.bg](mailto:modest@abv.bg) aŭ per poŝto al la adreso: Georgi Mihalkov, Sofio – BG-1229, “Vrabnica” 1, bl. 529 vh. A et. 9 ap. 33, Bulgario.**

## Interlingvistoj de la mondo unuiĝu!

La novaj eldonoj de Ipl (Informilo por Interlingvistoj,) kaj Ifl (ĝia anglalingva eldono: Information for Interlinguists) haveblas rete:

**Ipl (Esperante):** Trovu la novan numeron kaj pli fruajn numerojn ĉe:  
<http://www.esperantic.org/eo/publikajoj/ipl/>

**Ifl (angle):** Trovu la novan numeron kaj pli fruajn numerojn ĉe:  
<http://www.esperantic.org/en/publications/ifi-information-for-interlinguists/>



Informilo por Interlingvistoj estas publikaĵo de *Esperantic Studies Foundation* (ESF) kaj Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED). Ipl kaj ĝia anglalingva eldono (Ifl) disponigas informojn kaj ĝisdatigojn en la kampoj de planlingvoj, interlingvistiko kaj lingvoplanado. Ambaŭ eldonoj enhavas detalojn pri eventoj, novaj publikaĵoj, raportojn pri lastatempaj konferencoj, kaj disponigas multajn aliajn informojn por universitatoj kaj ĉiuj, kiuj interesiĝas pri interlingvistiko kaj rilataj kampoj.

Legu pli detale pri Ipl kaj la lanĉo de Ifl:

<http://www.esperantic.org/eo/2017/07/20/esf-lancas-novan-bultenon-kaj-revivas-alian/>

La limdato por kontribui al la sekva numero estas la 30a de junio 2020. Dankon!

La redakcio (Simon Davies, Angela Tellier and Humphrey Tonkin) [ipi@esperantic.org](mailto:ipi@esperantic.org)

Vortoj: 435

=====

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis 2020/18. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <[stefan.macgill@gmail.com](mailto:stefan.macgill@gmail.com)>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.